Johann Wolfgang von Goethe,

## Roz’ sur erikejo

*tradukita de Konrad Matheus*

Vidiĝis eta ruĝa roz’
de knab‘, sur erikejo.
Ĝi belis en matena ros’.
Hastis li al juna ŝos’
admiri ĝin kun ĝojego.
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz’,
roz’ sur erikejo.

Diris knab’: “Mi rompos vin,
rozo sur erikejo.”
Diris roz’: “Dorn’ pikos vin,
por ke vi ne forgesu min.
Al mi ne estu sufero.
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz’,
roz’ sur erikejo.

Kaj knab’ sovaĝa rompis ĝin,
rozon sur erikejo.
En defend’ roz’ pikis lin.
Sed ve’ kaj aĥ’ ne helpis ĝin.
Venis sort’ sen tolero.
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz’,
roz’ sur erikejo.

. . .

Johann Wolfgang von Goethe,

## Rozeto en herbejo

*tradukita de Gotthilf Sellin*

Knab’ rozeton vidis li,
Vidis en herbejo;
Estis juna, bela ĝi,
Por ĝin vidi kuris li,
Vidis kun ĝojego.
Roz’, rozeto, ruĝa roz’,
Rozo en herbejo.

Diris knab’: mi rompos vin,
Rozon en herbejo,
Diris roz’: mi pikos vin,
Ĉiam vi memoros min,
Mi ne ĝin permesos.
Roz’, rozeto, ruĝa roz’,
Rozo en herbejo.

Knab’ sovaĝa rompis ĝin,
Rozon en herbejo;
Kvankam roz’ defendis sin,
En koler’ ĝi pikis lin,
Tamen morti devis.
Roz’, rozeto, ruĝa roz’,
Rozo en herbejo.

. . .

Johann Wolfgang von Goethe,

## La rozeto

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Knabo vidis – jen rozeto
Sur la kampo staras;
Bela, juna la floreto . . .
Vive kuras la knabeto,
Ĝojas, miras, flaras.
Sur la kampo la rozet’
Kiel infanet’.

Knabo diris : « mi eltiros
Belulinon mian »;
Floro diris : « vi foriros, –
Per pikiloj mi disŝiros
Tuj la manon vian ».
Sur la kampo la rozet’
Kiel infanet’.

La sovaĝa knab’ ridante
La rozeton prenis, –
La floreto batalante
Sin defendis pikadante,
Sed la sorto venis.
Sur la kampo la rozet’
Kiel infanet’.

. . .

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de* Johann Wolfgang von Goethe *(*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de Konrad Matheus.*

*Arg-1022-2227 (2014-12-17 13:24:53)*

*S-ano Konrad Matheus loĝas en Mühlenweg 20, D-33038 Nieheim, Germanio.*

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de* Johann Wolfgang von Goethe *(*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Gotthilf Sellin *(*1844-05-18 – †1921-10-09).*

*Arg-1022-2071 (2014-12-16 16:00:17)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en* http://kantaro.ikso.net/rozeto_en_herbejo*. Tie oni povas aŭdi ankaŭ la melodion. Pri la tradukinto vidu la retejon* http://de.wikipedia.org/wiki/Gotthilf_Sellin*.*

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de* Johann Wolfgang von Goethe *(*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Ludwig Lazarus Zamenhof *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-1022-2070 (2014-05-23 12:25:14)*

*Tiu ĉi Zamenhofa poem-traduko troviĝas en* http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php*.*